# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 09/05/2024 sescentokdeksesa eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**3ZZZ** En la elsendo de la 6a de majo estas anoncitaj movadaj eventoj - ILEI konferenco kaj simpozio, realeca televido *Esperanto senlime*- aŭ trovĝas raporto pri pasinta evento kiel la foiro por instruistoj en Italujo. Vi trovas ankaŭ literaturaĵon : eltiraĵo de la verko de Mikaelo Bronŝtejn *Projekto vivo* kaj raporton pri esploro koncerne la lingvon de balenoj



Lundon la 3an de junio okazos la jarkunveno de la grupo. 2024 estas voĉdona jaro. Se vi volas kandidatiĝi , doni opinion , konsilon ktp… kontaktu nin je 3zzzesperanto@gmail.com *Franciska Toubale*

## Esperanta Retradio

Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŬskultadon kaj legadon Ĉiun tagonNe estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.
Tomatoj povus kreski sur Marso 6a de APRILO 2024 (*Roger Springer*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 4an de majo pluvegis do John venis al mia domo. *RogerS*



## La mondaj imperioj verŝajne ŝanĝiĝas

**Ĉu necesas monda milito por fari tion? Mi esperas ke ne.**
**Sed plaĉas al mi ke mi estas 93 jaraĝa.** *Roger Springer*

# Komento pri Trevor Steele kaj paco

La lasta artikolo de Trevor Steele "Si vis pacem..." estas rigardebla kiel insulto al tiuj malmultaj usonaj armilproduktantoj, kiuj dum jardekoj senlace elspezis tiom da mono por elektigi parlamentanojn kaj registarojn, kiuj aĉetos kaj aĉetigos iliajn produktojn. Ili devas fari tion por protekti la labora-postenojn en siaj fabrikoj, do temas pri speco de socia agado. Mi aldonu mian lastatempan sloganon: Nun ĉiuj parolas pri milito, esperantistoj parolu pri paco.



Bonvolu aliĝi al la rondo de Esperantistoj por paco. |\neniu kotizo. Simple sendu aliĝmesaĝon al per-esperanto-por-paco+subscribe@groups.io. *Renato Corsetti*

**KOKODA** Ĉefministroj Anthony Albanese (Aŭst.) kaj James Marape (P.N.G.), por memorfesti ANZAC Tagon pasintan monaton, kune marŝis laŭ parto de la peniga vojo Kokoda, alte en la montaro Owen Stanley en Papuo Novgvineo. Niaj nunaj amikoj, la Japanoj, estis tiam sadismaj malamikoj, ne nur kontraŭ Aŭstralianoj (kies lando ili volis alproprigi al si), sed eble eĉ pli kontraŭ la Ĉinoj. Kiel tempoj ŝanĝiĝas.

La helpo al aŭstraliaj soldatoj, precipe al la vunditaj, fare de la tiam tiel nomataj de Ozanoj, *fazi-vazi anĝeloj* ( pro la krispaj harbukloj de la lokaj homoj), neniam estos forgesita.

En ĉi tiuj maltrankvilaj tempoj, estis kortuŝe aŭdi la vortojn de Ĉefministo.
Marape, laŭdante la aŭstralian administracion en la postmilitaj jaroj, kaj ankaŭ fierante pro la sekvaj jaroj de sendependeco en sia propra lando: "Historio tenas ĉiujn detalojn, kaj la plej granda kaj plej profunda efiko de la aŭstralia administracio estas la demokratio kiun vi lasis kun ni."



Albanese Aŭs PM Marape PNG PM

*Vera Payne*



Eĉ Usonaj kaj Rusaj soldatoj povas kunvivi sen mortigi unu la alian *Roger Springer*



⭕ Usona militistaro en Niĝero deklaris "pliigitan staton de preteco" pro la ĉeesto de rusaj specialistoj en la sama bazo, en la sekurecaj taĉmentoj de Niĝerio diris al RIA Novosti. La rusoj estas postenigitaj ĉe la 101-a Aerbazo kune kun la usonanoj.

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 2-a de majo 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Kam Lee, Caroline Turner

**(1) Arkiva laboro (24-26 aprilo) –** Terry raportis pri niaj tri tagoj

Bona progreso .. sed restas laboro

Rigardu nian retejon … kaj ĝuu niajn malnovajn ĵurnalojn

**(2) Kurso en Sidnejo -** Jonathan

7 kromaj membroj .. bone progresas

Ili reklamis per Fajsbuko kaj Instagramm

**(3) Somerkursaro 2025**

Ni diskutis la monproponon de St.Ann.

Sufiĉe alloga

**(4) Esperanto Domo en Melburno**

La melburnanoj vizitis kelkajn lokojn kaj daŭrigas la serĉadon …….

**Venonta estrarkunveno**

Ĵaŭdon, la 16-an de majo 2024 je la 17:00 (16:30 en SA) *Sandor Horvath*

